1ª Jaro — № 3 — AŬGUSTO 1911

# BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la

**BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA**

(B. K. L. E.)

Nacia Sekcio de la INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

(I. K. U. E.)

## AŬGUSTO 1911

## ENHAVO:

Ĝojega Sciigo — Al niaj gelegantoj — La Reskripto de Romo por la Papa Benado — La Katolikoj kaj la Sepa — Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista — La Katolika Kongressemajno — Diservoj kaj Predikoj — Diversajoj — Letero de la Organiza komitato de nia « Dua » — La persekutoj en Rusujo — Novaj membroj — Belaj Vortoj — Proponoj por interkorespondado — Pri la alveno en Hago — Adresoj.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ĉe LEO HEIDENDAL

ARENDONK

NIEUW ! NIEUW !

## SPIRITA JUVELARO

Roomsch Katholiek Esperanto Kerkboek

Deze nieuwe uitgave is door twee Zeereerw. Geestelijken geschreven, welke voor dit doel eene mooie verzameling van keurige gebeden volgens de laatste voorschriften van Z. H. Pius X samenstelden tot een handig formaat Gebedenboekje.

**Prijs in Linnen bandje fr. 2.10, in Lederen bandje fr. 3,70.**

R. K. ESPERANTO-BOEKHANDEL

**A. N. GOVERS, — Westeinde 6**

DEN HAAG

---

## Vi Legu :

Espero Katolika
Nederlanda Katoliko
l'Espérantiste Catholique
Germana Katoliko
Kataluna Katoliko
Belga Esperantisto

---

London. — Thos Cook & son Adr. : Ludgate circus.
Turist-vaporŝip, kaj eksped-agentoj, K. t. pl.
Filioj tra la tuta mondo.

---

London. — Inkofabrikejo Henry Stephens.
Adr. : Aldergate str. London. La belegaj mondkonataj inkoj de Stephens estas multe imitataj, sed neniam egalitaj pri kvalito.

---

**Konataj medicinaj Produktoj**

**Burroughs Wellcome & K°**

LONDONO (Anglujo)

New-York — Montreal — Sydney — Cape Town — Milan, Shanghai — Buenos-Aires.

Petu belan senpagan ilustratan libreton en Esperanto.

1a Jaro. Nº 3 AUGUSTO 1911.

# BELGA KATOLIKO

ORGANO DE LA
Belga Katolika Ligo Esperantista
(B. K. L. E.)

NACIA SEKCIO DE LA
Internacia
Katolika Unuigo Esperantista
(I. K. U. E.)

BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA — JEZUO KUN NI

REDAKCIO : Por ĉio kio koncernas la redakcion (artikoloj — informoj — broŝuroj — libroj — k.t.p.) oni sin turnu al :

ADMINISTRACIO : Por ĉio kio koncernas la administracion (reklamoj — monsendoj — anoncoj — k.t.p.) oni sin turnu al :

Sro Leo Heidendal, ARENDONK.

## Ĝojega Sciigo.

Ni havas la plezuron sciigi niajn gelegantojn, eĉ antaŭ la oficiala anonco aperonta en « **Belga** Esperantisto » ke nia Amata Reĝa Moŝto Alberto, Oficiale Akceptas la

Altan Protektadon de la

Sepa Internacia Esperantista kongreso

en Antverpeno.

Ekkriu ni kun la kara Prezidanto de la « Belga Ligo Esperantista » kiu sendas al ni tiun bonan novaĵon :

Vivu ! Vivu ! Vivu la Reĝo !

### AL NIAJ GELEGANTOJ.

Jen, karaj amikoj, vi ricevas jam la 3an numeron de nia Bulteno tre baldaŭ post la akcepto de la 2a numero. Efektive, ni ne povas nin deteni de la plezuro publikigi senprokraste antaŭ la « DUA KONGRESO » en Hago, la agrablajn sciigojn kiujn ni jus ricevis. Tiel kiel vi legos en la sube presitan leteron de nia Altestimata protektoro, Mrg. Giambene, Substituto de la Kongregacio de la Sanktaj Indulgencoj, nia Sankta Patro Pio Xa sendis al ni RESKRIPTON, per kiu li donacas al ni, la Kongresanoj de la Katolika Haga Kongreso, plenaran Indulgencon, kondiĉe ke ni konfesu niajn pekojn al Pastro, kaj alproksimiĝu la Sanktan Komunion en la Preĝejo elektota de Lia Episkopa Moŝto de Haarlem. Plie, Li permesas al la Episkopo, elekti Pastron kiu povos doni al la Gekongresanoj la Apostolan Benadon je la nomo de la Sankta Patro, post la prediko en Esperanto, dum la kongreso.

Ni ne dubas ke ĉiu Kongresano gajnos tiun grandan gracon, kaj alproksimiĝos je la Sta. Komunio, se eble, ĉiutage dum la kongreso.

Pri la belaj kaj interesplenaj Ekskursoj dum la kongreso, ke niaj gelegantoj legu atente la sube presitajn avizojn. Tiel ili povos facile ĉion aranĝi oportunatempe, kaj fari la kalkulon pri la kostoj. Ili konstatos ke la kostoj por la vojaĝo, la logejo, la manĝoj kaj la ekskursoj, estas tre moderaj, tamen ĉiu devas fari bonan kalkulon kaj agi laŭ siaj monrimedoj. Pri la foriro are de Bruselo, kaj de Antverpeno, ni devos atendi ĝis la templimo fiksita en nia lasta bulteno, t. e. ĝis la 25an de Julio. Ni aldonos sciigon pri tiu temo je la lasta momento antaŭ la eldono de la Bulteno.

### LA RESKRIPTO DE ROMO POR LA PAPA BENADO.

La 8an de Julio, la prezidanto de I.K.U.E. ricevis la sekvantan gravan kaj afablan leteron de Mrg. L. Giambene, Substituto de la Kongregacio de Sanktaj Indulgencoj.

Ni nur donas la partojn de la letero kiuj havas ne privatan karakteron.

Romo, la 7 - 7 - 1911.

Kara Kunfrato,

Mi sendas al vi RESKRIPTON de la Sankta Kongregacio de St. Oficio pri la Papa Benado por la « DUA KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ EN HAGO ».

.......................................................

Dankon por la propono elekti min Prezidanto de la Komisio pri la ellaborado de Teknika Vortaro Teologia. Se vi opinias « *in Domino* » ke tiu elekto povus alporti gloron al Dio, mi ne malkonsentas.

.......................................................

Ne povante partopreni la Kongreson, mi petas vin ke vi kaptu laŭtempan okazon por doni al la Kongresanaro mian personan saluton. Ĉar mi estas profunde konvinkita ke Esperanto povos utili la Eklezion, mi tute ne hontas montri min *PUBLIKE* Esperanto-amanto.

Akceptu, Kara Kunfrato, mian plej koran saluton.

Via Sincere
D. L. Giambene.

Kune kun la letero estis la Oficiala dokumento, la RESKRIPTO mem, latine verkita, per kiu Lia Papa Moŝto Pio Xa permesas al Pastro nomota de la Episkopa Moŝto de Haarlem, la rajton doni, post la Prediko dum la Haga kongreso de Katolikaj Esperantistoj, la Apostolan Benon, je la nomo de la Sankta Patro.

Plie, Lia Papa Moŝto donacas al ĉiuj la Katolikaj Kongresanoj, plenarian Indulgencon kondiĉe ke ili konfesu kaj alproksimiĝu la Sanktegan Komunion en Preĝejo elektota de la Episkopa Moŝto.

Nia Prezidanto tuj sendis tiun gravan Reskripton al Mrg. Callier en Haarlem, kiu sciigos oportunatempe al ni, kiel kaj kie ni povos plenumi la kondiĉojn nomitajn.

Ni nur aldonas ke nia respektinda Protektoro apud la Sankta Seĝo, Mrg. Giambene, estas ne nur « *Persona Gratissima* », ĉe nia Sankta Patro Pio Xa, sed li estas ankaŭ tre klera Profesoro de Orientaj lingvoj en la mondfama Kolegio de la Propagando en Romo. Estas nepre necese insisti pri la altvaloro de tia opinio pri nia kara Zamenhofa lingvo. Estas por la Redakcio de « BELGA KATOLIKO » des pli agrabla publikigi tiun leteron, tial ke kelkaj malamikoj de nia lingvo kuraĝis, antaŭ ne longe, pretendi ke tiu klera Roma Profesoro favoris iun plagiaton de Esperanto pri kiu oni ne plu parolas.

## La Katolikoj kaj la "SEPA„

En nia lasta N° ni anoncis la afablan inviton ricevitan de Abato Richardson Prezidanto de I.K.U.E., de Lia Dekana Moŝto la Kanoniko Cleijnhens, Paroĥesto de la Katedralo de Antverpeno.

La celo estis la definitiva aranĝo de la Diservoj dum la « Sepa Internacia Esperantista Kongreso ». Ni aldonis : Ni sciigos la resultaton al niaj gelegantoj en nia proksuma N°. Ni nun plenumas tiun promeson.

Ni havas la ĝojan novaĵon certigi al niaj legantoj ke Lia Dekana Moŝto estas tre favora, tre simpatia al nia movado, ke li, kiel Mgr Giambene estas plene konvinkita ke Esperanto povos multutile la Eklezion, pro tio li estos preta ĉion fari por helpi nian Katolikan Komitaton.

Post zorga pridiskuto, jen la definitivaj aranĝoj. Dimanĉon 20an de Aŭgusto okazos la mondfama Procesio de la Sta Virgulino, pro tio neniu solena Diservo por Esperantistoj estos ebla. Tamen, je la 8a matene okazos Meso speciala por Esperantistoj en la Sta Josefa Kapelo de la Katedralo. Dum la Meso Abato Richardson, ne predikos, sed diros kelkajn vortojn esperante, kiel preparado al la Sta Komunio kiu disdoniĝos dum la Sta Meso oni klopodos aranĝi komunan kaj fratan matenmanĝon post la Komunio en Katolika hotelo, proksime la Katedralo. Pri tio, legu la anoncojn en la Akceptejo.

Je la 10a Granda Meso, kies muziko estos belega, ĉar la Antverpena Katedrala ĥoro estas famkonata en Eŭropo, Per speciala favoro de la Moŝta Dekano, seĝoj estos

numerigataj, kaj reservataj por la Esperantistaj Kongresanoj, sed, *bone notu*, nur por ili kiuj *mendos* ilin antaŭ la 10an de Aŭgusto, per skribaĵo al Abato Richardson, 121, rue du Marais, aldoninte poŝtmarkon por respondo kun bileto kaj numero de la seĝo. La homamaso estos tiel granda ke la Moŝta Dekano tute ne povas reservi seĝojn se li ne estos certa ilin plenigi.

Dimanĉon 27an de Aŭgusto ĝe la 10,30 matene Meso, kun Esperanta prediko kaj kantado de Esperantaj himnoj. Ĉar ĉi tio estos la *oficiala* kaj solena Diservo de la Kongreso, ni esperos ke la ĉeestontoj estos multnombraj. La Diservo okazos en la aparta Virgulina Kapelo apud, ne en, la Katedralo.

*Pri la Kunvenoj k.t.p.*

Tuj, kiam la kongresanoj alvenos en Antverpeno ili devos iri *rekte* al la Akceptejo por ricevi sian kongreskarton, gvidlibron k.t.p. La Akceptejo estas en la « *Athenée Royale* » Tie, en granda halo, ili trovos alîŝataj al la muro multajn anoncojn, pri la Kongreso, pri fakaj kunvenoj k.t.p. La anoncoj pri la Katolika fako estos skribitaj sur grandaj *roskoloraj* kartoj. Per tiuj anoncoj la Katolikaj kongresanoj sciiĝos la lokojn kaj la horojn de la diversaj Katolikaj kunvenoj, unuvorte, ĉion kiu povus interesi la katolikojn dum la Kongreso. Ke ili legu la anoncojn en la Akceptejo ĉiumatene, ĉar ofte, circonstancoj eble devigos la Katolika Komito ŝanĝi la sciigojn. En la Akceptejo estos anoncata la adreson de la hotelo kie loĝas Sro Heidendal la Sekretario de la B.K.L. kiu estos ĉiam preta doni sciigojn k.t.p. al la kongresanoj, pri katolikaj aferoj.

LA ORGANIZA KOMITATO.

II.

## Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

« I. K. U. E. »

# Dua Internacia Katolika Kongreso

14 — 18 Aŭgusto

en la Instituto de S-ta Vincento, Westeinde 99, Hago.

## HONORA KOMITATO.

### Honora Prezidanto :

Lia altreverenda Moŝto P. C. WIJTENBURG, Dekano de Hago, Paroĥestro de la St. Jacobo-paroĥo.

### Honoraj Membroj :

Mr. P. J. M. AALBERSE, membro de la Nederlanda Parlamento, ĝenerala sekretario de la « Katolika Sociala Agado », (Leiden).

Mr. TH. L. M. H. BORRET, Ŝtatkonsilanto (Hago).

Monsinjoro A. F. DIEPEN, Kanoniko de la katedralo « St Jan » en 's Hertogenbosch. Rektoro de la episkopa instruistlernejo en 's Hertogenbosch, Inspektoro de la Katolika Instruado en la dioceso 's Hertogenbosch, k.t.p.

Prof. F. FORSTMAN, Prof. de Teologio morala, Seminario Rijsenburg (Driebergen).

Prof. J. M. J. HUIJS, Seminario IJpelaar (Ginneken).

Prof. J. M. J. KNAAPEN, Abatejo « Berne » en Heeswijk, ĉefedaktoro de « Boekenschouw ».

P-ro CHR. KOPS. O. F. M. prof. de gimnasio en Megen.

D-ro H. W. E. MOLLER, privat-docento ĉe la Amsterdama Universitato.

Monsinjoro PRINSEN, Katedralo « St Jan » ; Paroĥestro de Sta Jakobo en 's Hertogenbosch, k.t.p.

Jhr. Mr. CH. RUIJS DE BEERENBROUCK en Maastricht, membro de la Nederlanda Parlamento. Prezidanto de la antialkoholista societeĝo « Sobrietas ».

P-ro L. SIMONIS, Ĉefredaktoro de la « Kruisbanier », 's Hertogenbosch.

P-ro D. A. W. H. SLOET, paroĥestro de Abconde, Prezidanto de la Apologia Asocio « Petrus Canisius ».

P-ro WILLEM SMULDERS, literaturisto en Made.

---

## Organiza Komitato :

Prezidanto : P-ro LAMB. J. J. POELL, Prez. de N. K. en Tilburg.

Sekretario : S-ro JOS. VAN GELDROP. Da Costastr. 24, 's Gravenhage.

Kasistinoj : S-no WHITNEY HEKKING kaj F-ino M. BORRET.

Membroj : S-ro Fr. SLEIJFFERS, S-roj JOH. LUNEMAN, E. GOVERS kaj H. F. POTHARST, ĉiuj en Hago.

---

## Kongresestraro :

Prezidanto : Pastro AUSTIN RICHARDSON, Prezidanto de I. K. U. E. en Bruselo (Belgujo.)

Vicprezidantoj : S-ro W. LUTKIE Lzn., en Reijen (Nederlando).
S-ro Fr. SLEIJFERS, en Hago (Nederlando.)

Sekretarioj : S-ro CLAUDIUS COLAS, en Pariso (Francujo.)
S-ro J. N. J. SMULDERS, en Schijndel (Nederlando.)

Kasistinoj : S-no L. WHITNEY-HEKKING, en Hago (Nederlando.)
F-ino MATH. BORRET, *Prins Hendrikstr. 21, 's Gravenhage* (Hago) *Nederlando.*

## La Katolika Kongressemajno.

en Hago, 13-19 Aŭgusto.

SINOPTIKA RESUMO.

13 Aŭg. Ĉiujarkunveno de « Nederlanda Katoliko ».
— 9 h. Sankta Meso, ĝenerala Komuniiĝo kaj prediko en Esperanto.
— 12 1/2 h. Ĉiujarkunveno.
— 4 h. Komuna tagmanĝo ; poste promenado al *Scheveningen.*

« NIA DUA ».

14 Aŭg. 8 h. vespere : Malferma kunveno de la Dua Intern. Katol. Kongreso.
15 Aŭg. 7 h. Sankta Meso kun Sankta Komuniiĝo ; prediko en Esperanto. — Komuna matenmanĝo. Veturilekskurso kaj lunĉo.
— 2-5 h. Kunveno.
— — Tagmanĝo.
— 8-10 h. Kunveno.
16 Aŭg. 8 1/2 h. Funebra meso kun prediko ; en Esperanto ĝenerala Komuniiĝo.
— — Komuna matenmanĝo.
— — Ekskurso al *Marken* ; lunĉo sur sur la ŝipo ; tamanĝo en *Amsterdam.*
17 Aŭg. 7 h. Sankta Meso.
— 10-12 h. Kunveno.
— — 2a Matenmanĝo.
— 2-5 h. Kunveno.
— — Tagmanĝo.
— 8 h. Koncerto, ankaŭ ĉeestebla por neanoj.
18 Aŭg. 8 1/2 h. Sankta Meso kun *Te Deum* kaj prediko, en Esperanto.
— 10-12 h. Kunveno.
— — Ekskurso al la havenurbo *Rotterdam.*
— — Tagmanĝo.
— 8 h. Ferma kunveno.
19 Aŭg. Adiaŭ kaj foriro.

## Diservoj kaj Predikoj.

**dum « Nia Dua »,**

en la Haga ĉefpreĝejo de S-ta Jacobo en la Parkstrato.

Ĉiumatene S-taj Mesoj por la Kongresanoj
Mardon 15 Aŭg. Mariafesto. Tiun ĉi tagon estas devige ĉeesti la S-tan Meson, kiu okazos kun prediko en Esperanto je la 7-a.
Mercredon 16 Aŭg. Solena funebra Meso je la 8 1/2a. Ĝenerala Komuniiĝo. Prediko en Esperanto.
Jaŭdon 17 Aŭg. S-ta Meso je la 7-a.
Vendredon 18 Aŭg. Je la 8 1/2-a S-ta Meso kun prediko en Esperanto kaj *Te Deum*.
Supozeble predikos P-ro A. Richardson (Belgujo), D-ro Coll (Hispanujo), P-ro Bianchini (Italujo.) P-ro Parker (Irlando).
P-ro Poell (Nederlando predikos la 13 Aŭg. (Ĉiujara kunventago de N. K.)

## Festoj kaj Ekskursoj.

Lundon 14 Aŭg. Je la 8-a vespere **malferma kunveno** Ĉiuj, ankaŭ ne-esperantistoj, estas kore invitataj. Salutoj de diverslandaj delegitoj, legado de telegramoj kaj leteroj, kantoj. P-ro *G. Van Poppel*, Prof. en Rolduc, nun loĝanta en Weissensee, apud Berlin, parolados por la ne-esperantistoj.
Mardon 15 Aŭg. Matene **veturilekskurso** kun lunĉo.
Merkredon 16 Aŭg. Ekskurso al **Marken**
Jaŭdon 17 Aŭg. Je la 8-a vespere **Koncerto**. La detalaĵoj estos poste publikigataj.
Vendredon, 18 Aŭg. Tagmeze ekskurso al la marhaveno **Rotterdam**.
artikolon.)
Ĉiutage komunaj manĝoj.
K.t.p.

## DIVERSAJOJ.

**Alveno en Hago — Akceptejo.**

Hagaj samideanoj, antaŭsciiĝinte pri horo kaj stacidomo de alveno, diros bonvenon al la alvenintoj kaj helpos ilin laŭpove.

La **Akceptejo** estas en l'Instituto de S-ta Vincento, Westeinde 99, kie ankaŭ okazos la Kongreso. Alvenintoj iru tien, por ricevi ĉiujn bezonatajn informojn. Alveninte per la « Stata fervojo (Holande : Staatsspoor) iii prenu la tramvojojn no. 4 ; alveninte per la « Holanda fervojo », ili prenu la tramvojojn no. 2. Malsupreniri ĉe la *haltejo Assendelft-strato*.

**La Katolika Esperanto-Oficejo**, Westeinde 6, estas proksime de la Kongresejo.

---

**De la Organiza Komitato de nia « DUA » ni ricevis la sekvantan leteron :**

Hago, 22-7-1911.

Estimata Redakcio.

Bonvolu presigi en via Augusta numero :

1e Ke la Organiza Komitato povas zorgi por malkaraj ĉambroj en hoteloj kaj pensionoj, de f. 0.75 ĝis f. 2.50, kun matenmanĝo. Oni bonvolu plej baldaŭ skribi, kiajn ĉambrojn oni deziras ;

2e Ke aliĝiloj povas esti sendotaj ankaŭ *post* la 1a de Aŭgusto. Oni tamen ne prokrastu ĝis la lasta momento ;

3e Ke ekskurso al *Marken* okazos ne la 16an de Aŭgusto, sed la 17an ;

4e Ke koncerto okazos la 16an, ĉeestebla *nur* por gekongresanoj ;

5e Ke la 10an de Aŭgusto komuna dua matenmanĝo okazos antaŭ ol foriri Roterdamen.

La Organiza Komitato.

---

## LA PERSEKUTOJ EN RUSUJO.

Oni scias, ke unu el la ĉefaj celoj de l'Katolikesperantista movado estas: la reunuiĝo de la Kristanaj Eklezioj sub la Roma Papo. La malnov-ortodoksa Eklezio en Rusujo klopodas tion eviti per persekuto de la Esperantistoj. Multaj el ili estas malliberigitaj. Dum la nokto 23-24an de Aprilo (10-11an laŭ malnova stilo) la policaro inspektis la domojn de kelkaj anoj de l' Rusa Esperantista Ligo : tiu dominspekto kondukis al arestoj kaj al la leĝe preno de l' arĥivoj de la Ligo.

Jam antaŭ kelka tempo S-ro Zĵenin, membro de konsilantaro de la urbo Egorjevsk, kaj apartenante al la malnov-ortodoksa reli-

gio, estas malliberigita kaj proceso kontraŭ li komencis.

S-ro Zjenin estas akuzata, uzinte sian aŭtoritaton kiel urbestrarano, por efektivigi la projekton de unuiĝo (de l' Eklezioj sub Romo) de la Jezuito Wiercinski, kiu estas ekziligita de la Rusa registraro.

Zjenin ĉefe estas akuzata, vojaĝinte en Marto de l'antaŭa jaro al Parizo, je la « falsa « pretekslo, ĉeesti Esperantistoj-Kongreson, « kvankam li vojaĝis al Katolika Kongreso, « por labori al la reunuiĝo de l' malnov-« ortodoksa kun la Roma-Katolika Eklezio ».

Ankaŭ S-ro Zjenin intencis ĉeesti la Duan Internacian Kongreson de Katolikoj, tenotan de la Internacia Katolika Esperantista Uniĝo en Aŭgusto de l' nuna jaro en Hago. Tamen oni ne vidos lin tie.

En la malliberejo li preĝos por la sukceso de la tien laboro. Ni preĝu ke Dio lin fortigu en lia sufero.

(El « De Residentiebode » tradukis *Nomeco.*)

# Novaj membroj.

Sro E. Herbays. Watermael apud Bruselo.

Sro Wallace Mackay, Newcastle-on-Tyne, Anglujo.

Z. Eerw. Heer Peeters, Leeraar in 't klein Seminarie, Vlaamsche Letteren. Sint-Truiden.

Z. Eerw. Heer Xaverius Molhant, kapelaan der St. Maartens kerk, Leeraar aan de Staatsmiddelbare School te Sint-Truiden.

Sro Ant. Goeijens. Studanto de la Liega Universitato. Sint-Truiden.

Z. Eerw. Pater Camilius Van de Steene, Redemptorist Provinciaal der EE. PP. Redemptoristen van Belgie Brussel.

Le Très Révér[d] Père Van Rossum, Redemptoriste, Consulteur de la Congrégation du St. Office, Consulteur du Révérendissime Père Recteur Majeur des Redemptoristes, Via Merulana, Romo.

Le Révérend Père Schäfer, Redemptoriste, Secrétaire du Recteur-Majeur des Redemptoristes. Via Merulana, Romo.

Le Révér[d] Père Ponchau, Redemptoriste, Lecteur de 4[e] latine Collège Eucharistique, Esschen-Frontières.

Le Révér[d] Père Claude, Redemptoriste, Lecteur de Poésie, Collège Eucharistique, Esschen-Frontières.

Le Révér[d] Père Offenberg, Redemptoriste, Lecteur de Mathématiques et de Sciences Naturelles, Collège Eucharitique Esschen-Frontiéres.

Le Révér[d] Père Lefèvre, Convent des RR. PP. Redemptoristes, Rue Belliard. Bruxelles.

Société Belge de Librairie. Rue Royale, Bruxelles.

Eerw. Heer Schoofs, Student in Godsgeleerdheid, Bisschoppelijk Seminarie. Luik.

Eerw. Heer A. van Heesch. D[r] en Leeraar in Godsgeleerdheid, Abdij van Grimbergen.

Eerw. Heer J. Louwet, Bisschoppelijk Seminarie, Luik.

Eerw. Heer. H. Keufgens. Bisschoppelijk Seminarie, Luik.

## BELAJ VORTOJ.

Ni ne povas nin deteni de la plezuro citi ĉi tiujn lastajn vortojn de artikolo subskribita de la Organiza Komitato de la Haga Kongreso, en la Junia numero de « Nederlanda Katoliko ».

Unu lingvo parolata kaj komprenata de ĉiuj homoj

Unu lingvo ! ne por elpuŝi la ekzistantajn naciajn lingvojn, sed por faciligi la interrilatojn internaciajn, por ebenigi la vojon al la paco inter la homaro.

Unu lingvo ! por laŭdi :
Unu Dion en la ĉieloj.

Unu Veran Religion, konfesata de la Sankta Katolika Eklezio.

Unu lingvo por alproksimigi la plenumon de la projetaĵo.

Unu ŝafaro, kaj unu paŝtanto.

Kaj nun : al la kongreso, al « Nia Dua » ni laŭeble penadu efektivigi nian belan idealon.

Por batali, kiel indaj filoj kaj filinoj de la de Kristo vera Eklezio surtera, la paceman batalon por nia Sankta Kredo kaj ĝia celo majesta.

Paco surtera al ĉiuj homoj bonevolemaj kaj la ĉiela Paco dum la eterneco.

Ni bataladu, zonitaj je la fortikaj batiloj, kiujn ni posedas en Nia Sankta Kredo, kaj je la nova ilo, nia internacia helplingvo, Esperanto.

Antaŭen !

LA ORGANIZA KOMITATO.

## PROPONOJ POR INTERKORESPONDADO.

La grupo « Fideleco » Prezidanto Sro. R. Wenke, 46 II Schaeferstrasse, Dresden, Saxe.

Sro. Ramono, Villa Villarroel, 42. 4. 4. Barcelono. Hispanujo.

Sro. Josepho Colls, Purissima strato, Barcelono, Hispanujo.

Sro. Frederico Camón, Skulptisto, Bajada de Sta. Eulalia, 3—1. Barcelono, Hispanujo. (Precipe pri artaĵoj).

Sro. Josefo Arnella, Lhobet, Seminario en Barcelono, Hispanujo

Sro. Erhardo Urban (Bohemio) Hôtel Baltimore, 88 II, Avenue Kleber, Paris.

Hulla Esperantista Societo. Sekretario Sro. W. Uttley, 18, Fountain Street, Hull, Alglujo.

Sro. Hr. Daskoloff, lernanto, Gimnazio Pleven, Bulgarujo.

Fino. Radka kaj Dro. Kozarova, Strato Aleksandrovska 247, Pleven, Bulgarujo.

Sro. Ali Kamber, Kapitano, Nazli, Azia-Turkujo.

Sro. Bojat Vladimiro, Liozno, Rusujo. (Gub. Mohileva).

La anoj de la Odessa Societo, Skribu al :

Sro. A. Tertus, Societo Kotlarevski, Odessa. Rusujo.

Sro. Nankivell, Torquay Devon, Anglujo.

Sino kaj Fino R. Popovitch, Danilovgrad Donji, Zagarač, Montenegro.

Pastro J. Paras, Paroĥestro, Convento de Toledo, Cebu, Filipin' Insuloj.

P. Baluyot, Paroĥestro, Convento de Tagliluron, Bohol, Filipin' Insuloj.

Sro Henry F. Eils, St Louis University 215, Grand Avenue St. Louis — Mo. United States N. America. Kun gekatolikoj.

## *Pri la alveno en Hago*

*Abato Richardson skribas al ni : Kara Redaktoro,*

Fine, post multaj pridiskutoj, post multaj pridemandoj, jen, laŭ mi, la plej taŭga decido.

a) Ne Organizi karavanon. Estas malfacila certigi la ĉeeston de la necesa nombro de kongresontoj, kaj pli malfacile kontentigi ĉiujn, pri la horo kaj la urbo de la foresto.

b) Tamen, por ili kiuj ŝatus vojaĝi kun gesamideanoj, paroli esperante, kaj eĉ vojagante, fari iom da propagando, mi proponas tre bonan kaj taŭgan vagonaron. Parto de la kvazaŭ-karavano povus sin renkonti en Bruselo, kaj la alia parto aliĝi al ĝi en Antverpeno.

Tiu bona, taŭga vagonaro forveturos el la Norda-Stacidomo de Bruselo lundon la 14ⁿ de Aŭgusto je la 9.33 matene. Ĝi alvenos en Antverpeno je la 10.23, forveturos de Antverpeno je la 10.32 kaj alvenos en Hago je la 1.31. Tie, je la stacidomo, alvenos por akcepti nin, kaj *esperantmuniere* konduki nin al la Akceptejo, deputataro de niaj Hagaj kunliganoj. Mi promesos al niaj amikoj agrablan surprizon. Sed jen grava avizo : se ni volas vojaĝi kune, ni devas ĉeesti la stacidomon sufiĉe frue por trovi la vagonojn malplenajn. Do, mi petas la geamikoj ĉeesti la Norda stacidomo jam je la 9a matene. Ke ĉiu portu *tre videble* la verdan stelon, kaj ke la renkonto okazu sur la kajo de la stacidomo, apud la vagonaro, aŭ almenaŭ

apud la loko kie la vagonaro por Hago kaj Amsterdamo forveturos. Pétu informon pri tio al la staciofisistaro. Pri la biletoj, laŭ miaj informoj, oni ne pli, de post la 1a de Januaro 1911, vendas biletojn por iri kaj reveni, do la plej bona estas preni nur simplan bileton ĝis Hago. Mi konsilos preni la *duan* klason, ĉar la diferenco ĝis Hago estas malgranda, kaj la komforto de la dua klaso estas granda.

c) Pri la diversaj biletoj por la ekskursoj k.t.p. mi konsilas al niaj amikoj atendi. Post ilia alveno en Hago ili povos pli oportune peti konsilojn al la organiza komitato en la kunvenejo. Prenante rondirantajn biletojn en Belgujo, ili riskus suferi komplikaĵojn pro la jam ekzistantajn kongresekskursajn biletojn. Vidu la sciigojn sur la verda aliĝilo presitajn per la zorgoj de la organiza komitato de la kongreso. Estos facile en Hago mem decidi pri la ekskursoj, kaj aĉeti la biletojn en la Akceptejo.

Tamen, se niaj legantoj dezirus vidi kaj konstati kiom da belegaj ekskursoj la Holanda Fervoja Societo preparis por ebligi la fremdulojn bone kaj komforte viziti tiun interesan landon, mi konsilos al ili skribi, *Esperante*, al la ĉefagento de la Holandaj fervojoj, *51 rue Henri Maus*, Bourse, Bruxelles. Ili devas nur diri ke ili deziras ĉeesti la Katolikan Esperantistan Kongreson en Hago kaj samtempe sciiĝi pri la diversaj aranĝoj por fari ekskursojn en Holando. Poste, bone kaj klare skribi sian nomon kaj adreson. La S° Ĉefofisisto afable promesis min ke al ĉiu, *tiele petanta*, li sendus tute senpage, belan gvidlibron kaj diversajn libretojn kun sciigojn pri, simplaj biletoj, ekskursaj biletoj, kajeroj kaj kartoj kilometraj, kombino speciala de la holandoj fervojoj. k.t.p. Mi ricevis tiujn libretojn. Ili enhavas artplenajn ilustraĵojn, kaj formas belan memoraĵon de la kongresvojaĝo.

Esperante renkonti multajn gesamideanojn en Bruselo, kaj Antverpeno, Lundon 14n de Aŭgusto.

Mi petas vin, Kara Redaktoro, akceptu mian amikan manpremon
Tute via en Jezu kaj Maria
AUSTIN RICHARDSON,
Prezidanto de I.K.U.E.

## ADRESOJ.

Informojn pri alveno, loĝado, ekskursoj, k.t.p. ĉe la anoj de la Organiza Komitato, ĉiuj en 's *Gravenhage* (Nederlando):

S-ro F. Sleijffers, Prins Hendrikstr. 93 — S-ro Jos. van Geldrop, Da Costastr. 24 — S-ro H. F. Potharst, Breugelstr. 63 — S-ro E. Govers, Westeinde 6 — S-ro Joh. Luneman, v. d. Neerstraat 40 — S-ino L. Whitney-Hekking, Weimarstrasse 321 — F-ino M. Borret, Prins Hendrikstr. 21, *kasistino de Nia Dua*.

Al la kasistino F-ino Borret oni sendu aliĝilojn kaj mendojn.

Adresoj por informoj pri la oficialaj Kongreslaboroj:

P-ro A. Richardson, prezidanto, rue du Marais 121, Bruxelles (Belgique);

D-ro J. N. J. Smulders, sekretario, en Schijndel (Nederlando).

## PREZOJ.

| | Sm. *) |
|---|---|
| Kongreskarto [Vidu « Regularo » § 8] . . . . . . . . . . | 2.10 |
| Helpkongreskarto . . . . . . | 1.05 |

Ambaŭ aĉetantoj tiel de kongreskartoj kiel de helpkongreskartoj *ricevos senpage la Oficialan Kongresraporton*. Ni publikigos iliajn nomojn kaj adresojn.

| | Sm. |
|---|---|
| Kongresmarkoj, po 100 . . . . . | 0.45 |
| » po 1000 . . . . | 3.85 |
| Artplena granda kongresafiŝo (vidu la kovrilon p. 1) . . . . . | 0.45 |
| Ĉiu komuna matenmanĝo . . . | 0.65 |
| Ĉiu komuna tagmanĝo . . . . | 1.25 |
| Veturilekskurso (15 Aŭgusto) . . . | 1.70 |
| Ekskurso al Marken k.t.p. / Matenmanĝo, tagmanĝo en Amsterdam | 4.80 |
| Ekskurso al Rotterdam . . . . . | 2.30 |
| Gvidlibro / Plano de l'Hago . . . . | 0.50 |

Oni estas petata *tuj* forsendu la aliĝilon kun poŝtmandato aŭ ĉeko.

## ĈEKBANKO.

Por plifaciligi la mendojn de la kongresaĵoj en ĉiuj landoj de la mondo, la kongreskomitato de « Nia Dua » malfermis konton ĉe la Ĉekbanko Esperantista en London.

Per la ĉie konataj ĉekoj kaj transpagiloj povas pagi personoj en ĉiuj landoj de la mondo eĉ la plej malgrandan sumon.

Precipe por la landoj, kie la interternacia poŝtmandatsistemo ne ekzistas, la ĉekbanko esperantista tre utilas.

La transpagiloj povas samtempe funkcii kiel korespondkartoj; la sistemo estas do tre praktika kaj malmultekosta.

Ĉekoj kaj transpagiloj por nia kongreso oni skribu al: « 2a Kongreso Internacia de Katolikoj Esperantistaj, Fraŭlino Math. Borret, Prins Hendrikstraat 21.

LA ORGANIZA KOMITATO.

INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.
(I. C. E.)

Monata ĵurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la interŝanĝo de poŝtmarkoj. kaj korespondado per ĉiuj lingvoj. la Abono = frkj. 2.50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio: Avenue du Moulin, 16, Forest-Bruxelles.

## PROPONOJ POR INTERKORESPONDADO.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ.

La grupo de Basel, Svisujo. Adreso: S-ro Rusterholz. Prezidanto 22. Marschalkenstrasse.
F-ino Maud Sewell, Whitehall Cottage. Bishops Storford, Anglujo.
S-ro Wallace Mackay, 22, Coniston Avenue. Newcastle-on-Tyne. Anglujo.
S-ro T. Tchacarevitch. Lycée Imp' Ottoman, Uskul, Turkujo.
S-ro G. N. Appleton, Lynchburg. Va. United States N. America.

## Rekomendindaj Firmoj

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai. Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpaĵoj : ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX kaj Filoj : 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.

# LIBREJOJ Esperantistaj

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.
Spineux & C° Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

# HOTELOJ

COURTRAI : « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko, apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.
La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.
**Oni parolas Esperante.**

LONDONO : Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ». Sinjorino O'Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square. Bayswater, London, W. Tre moderaj prezoj.

INKOFABRIKEJO

HENRY STEPHENS

Aldergate str. LONDON

Kvankvam multe imitataj la belegaj mondkonataj inkoj de Stephens estas neniam egalitaj pri kvalito

EKSPED-AGENTEJO

THOS COOK & SON.

LUDGATE CIRCUS

LONDON

Filioj tra la tuta mondo